

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.  
Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

### Profektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page, advokato, Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
I. Gili Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 209**  
**14. 9. 1924**

Redakcio:  
Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin, L. K.  
Administracio:  
Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo  
po numero egalvaloro de 0,05 dolaro  
aŭ 0,30 sv. fr. por landoj, kies valuto  
superas maksimume 60%; por ĉiuj aliaj  
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fr.  
Anonprezo  
po kvadrata-centimetro egalvaloro de  
0,20 sv. fr. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.),  
en „Internacia Komerco“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

## Sub la suno dalmacia.

*Sub la suno dalmacia  
Serenega, sorĉradia  
Verdas palmoj en ĝardeno,  
Verŝas fruktojn dia beno.  
Bluas maro kaj ĉielo,  
Blankas domoj, blanka velo,  
Blankas rokoj de l' montaro,  
Logas dolĉa vinberaro.*

*Sub la suno dalmacia  
Serenega, sorĉradia  
Kreskas bonodora floro:  
Kreskas amo en la koro.  
Luligante en boato  
Jen knabino kun amato!  
Milde manon man' karesas,  
Mondon ili tutforĝesas.*

*Sub la suno dalmacia  
Vagas mi kun kor' ebria:  
Tro da belo, tro da lumo!  
Songverigo, revplenumo! —  
Kiam hejmen mi revenos,  
Ĉiam en memor' mi tenos  
Vin, ho lando sunradia:  
Paradizo dalmacia!*

T. J.

## La Deksesa.

(Daŭrigo.)  
Al la maro.

Ĵaŭdon la 21 aŭgusto, antaŭtagmeze je 10.30 h la gesamideanoj de Zagreb kaj ĉirkaŭaĵo ka ankaŭ kelkaj eksterlandanoj, kiuj venis de la Deksesa, renkontiĝis antaŭ la stadiono de Zagreb por veturi en komuna karavano per personvagonaro al Suŝak kaj de tie per ŝipo al Split. Por ni esperantistoj estis rezervita speciala vagono, sed pro neatenado de la fervojestro ĝi estis parte jam okupata per neesperantistoj. Tamen post kelkaj stacioj ĉiuj havis sidlokon.

Mi ne povas precize priskribi la veturadon per la fervojo, ĉar mi pli atentis la ĉarman babiladon de kroataj samideanoj ol la preterflugantan pejzaĝon. Mi nur rememoras, ke ni veturis komence tra fruktodona kamparo, poste tra montaro, trapasante multajn tunelojn. Sed je la fino de la veturado, kiam la fervojo en multaj serpentinoj malsupreniris de la montaro kaj alproksimiĝis al la Golfo de Quarnero, mi kiel ĉiuj aliaj staris apud la fenestro kaj atentis por ekvidi la maron.

Subite kvazaŭ per unu voko ĉiuj ekkriis: La maro, la maro! Kaj profunde antaŭ ni aperis sorĉa bildo — la golfo, ĉarme kadrumita de la montoj.

Daŭris ankoraŭ sufiĉe longan tempon, ĝis kiam la vagonaro superis la multajn serpentinojn, kaj jam regis krepusko, kiam ni atingis Suŝakon, la sudslavan fraturban de Fiume, kiu nun apartenas al Italujo.

Post plua horo ni havis niajn ŝipbiletojn kaj povis suriri la vaporsipon „Zagreb“, kiu devis nin porti al Split, la urbo de la II-a Sudslava Esperanto Kongreso.

### Sur Adriatiko.

Benata estas tiu ĉi nokto. La maro kuŝas tute kviete; malgranda ondetoj fremetas mallauĉe. Kaj ĉiu ondeto argente reflektas la ĉarman brilon de l' duonluno aŭ la pli intiman radion de la stelo.

Ankaŭ sur la „Zagreb“, kiu nin portas al Split, regas silento, kvankam la ŝipo estas plen-

plena je pasaĝeroj, el kiuj nur malmultaj trovas lokon en la kajutoj. La ceteraj staras apud la pavezo, rigardante la vastan maron, aŭ sidas sur benkoj aŭ seĝoj aŭ kuŝas sur la plankoj de la ferdeko. Kelkaj dormas aŭ provas dormi.

Al mi dormado estus neebla. Dormadon en tiu ĉi benata nokto mi eĉ opinius peko por mi.

Sur la ferdeko mi kuŝas, flankon ĉe flanko kun juna bela kroata samideano; ŝian alian flankon okupas hina samideano. Ni jen silenteme rigardas la vaste volbitan ĉielon plensemitan je steloj, jen ni interparolas flustre pri profundajoj kaj veraĵoj de l' vivo, pri kiuj ni ne parolus dum ordinara tempo kaj sub ordinarej cirkonstancoj. Sed tiu ĉi benata nokto, tiu intima brilo de luno kaj steloj, tiu mallaita bruelo de la ondetoj, tratranĉataj de la potenca korpo de nia ŝipo, malfermas la koron kaj devigas la homojn elparoli sekretajn, kiujn ili alitempe kaj aliloke gardus kiel sanktaĵojn.

Neniam en mia vivo mi forĝesos tiun belegan nokton sur Adriatiko, tiun intiman interbabiladon per nia lingvo Esperanto. Sed ĝi, kiamaniere ni estus povintaj elŝuti nian koron troplenan je mondĉirkaŭemaj sentoj pro la neordinara tempo kaj loko? Ĉar tro diferencaj estas la lingvoj kroata, hina kaj germana.

Kaj nia lingvo eĉ multe pli taŭgas por elparoli tiajn intimajn veraĵojn ol la ajn nacia lingvo. Parolu, kion vi volas, en Esperanto ĝi sonas iel moligite, iel mildigite, iel dolĉigite, kvankam ĝuste la vero ofte estas maldolĉa kaj kruda.

Ho vi miaj karaj kunuloj dum tiu nokto, estu al vi la sorto favora, donu ĝi al vi ankoraŭ multe da felĉo, multe da ĝojo dum via vivo! Elkore mi deziras ĝin al vi.

La ŝipo daŭrigas sian veturadon tra la silentema nokto. La luno sekvas sian antaŭdestinitan vojon sur la firmamento. Ankaŭ la steloj ŝanĝas sian pozicion malrapide sed videble. Je unu flanko kelkaj dronas en la maro, je alia flanko novaj levigas el la akvoj. Estas kvazaŭ iu multipova sorĉisto preterŝovus gigantan tabulon kun milionoj da lampetoj antaŭ niaj okuloj direktataj alsupre.

Nia kunulino serĉas sian stelon sur la firmamento, sed ne trovas ĝin. Bedaŭrindulino!

Mi atendas la mian. Mi scias, ke ankoraŭ ĝi ne povas esti videbla; sed mi scias ankaŭ, ke ĝi aperos, malfrue sed certe. Mi konas ĝin bone. Do kial maltrankviliĝi?

— Estas ĉirkaŭ la dua horo nokte. Jam delonge ni silentas. Nia kunulino ŝajne ekdormetis. Senbrue mi levigas de sur la ferdeko, alpaŝas la pavezon.

Jen lumoj en la malhelo, kiuj alterne ekbrilas kaj estingiĝas — unu mallonge ekbrilanta kaj estingiĝanta luno post la ŝipo, kaj unu en pli longaj paŭzoj ekbrilanta kaj estingiĝanta luno antaŭ ni. Estas signaloj de lumuroj, kiuj montras al nia ŝipo la vojon inter insuloj kaj riĝoj.

La tuta veturado iras en kelka distanco laŭ la marbordo. Maldekstre ĝi tiriĝas kiel malhela strio, kelkloke strange formita per montaro Velebit kaj poste per la Dinaraj Alpoj, dume dekstre en la Adriatiko de tempo al tempo aperas insulo. Oni nomas tiun regionon ja la regionon de Mil Insuloj. Mi ne scias, ĉu la nombro estas tute preciza; sed certe, la insuloj povas esti kalkulataj je multaj centoj.

La tempo forpasas. Baldaŭ devas aperi mia stelo. Kaj rigardu, ĵus ĝi levigas el post la montoj; ĝian radian brilon hele reflektas la maro. Ho mia kara stelo, mi amas vin. Malfrue vi aperas, sed des pli ĝoje mi akceptas vin. Estu kore salutata sur Adriatiko. Ĝis nun mi vidis viajn radiojn rebriili nur malforte en la ondoj de

l' Rejno; en tiu ĉi benata nokto kaptas ilin kaj brile ilin redonas la magia maro. —

Ekkrepuskas. Blovas freŝa matenvento. La pasaĝeroj vigliĝas, ekstaras ĉe la pavezo por atendi la sunleviĝon.

Cu plumo kapablas priskribi tiun miraklon, tiun grandiozan spektaklon? Eĉ pentristo ne havus kolorojn por pentri ĝin tia, kia ĝi sin prezentas en efektivo.

Ni staras ĝuante, admirante. Tie post la altaj montoj ĝi aperis — la majesta astro de l' tago, kaj tuj la tuta maro ekfajreris; ĉiu unuopa ondeto kaptis radion, kvazaŭ jam delonge sopirinte ĝin, kaj reflektis ĝin ore kaj gloro. Kaj jam la radioj fariĝas tiel fortaj, ke ili blindigas la okulon.

Nun sekvas ĝenerala preparado por la tago: lavado, purigado, matenmango, trinkado de kafe, por ke oni povu je novaj fortoj daŭrigi la vojaĝon.

Ĉarmaj bildoj prezentas sin al la okulo ambaŭflanke de la ŝipo: maldekstre bordo kaj montaro, dekstre insuloj.

Je 8 h. nia ŝipo olproksimiĝas al haveno, preterpasas ĉarman fortikaĵon, kiu nun servas por radiostacio, kaj albordeĝas en Ŝibenik (Sibenico). Havante restadon de pli ol unu horo, ni vizitas la interesan urbeton, superstaratan de antikva kastelo, admiras unuafoje la preskaŭ italan karakteron de la stratoj kaj konstruaĵoj kaj poste reensipiĝas.

Post Ŝibenik ĉiu sopiras alveni en Split. Sufiĉe longe jam daŭras la ŝipvojaĝo, oni estas kontenta per la multaj jam spertitaj ĝuoj kaj deziras plejble baldaŭ konatiĝi kun la urbo de la II-a Sudslava Esperanto Kongreso.

Kiam post tagmezo subite eksonas la voko: „Split videbla!“, ĉiu ĝojigite kuras al la pavezo por elrigardi. Kaj tie malproksime, antaŭ la fundo de blankaj montoj, ekvidebliĝas etaj, etaj blankaj konstruaĵoj, apenaŭ distingeblaj de la montaro.

Ankoraŭ duona horo, kaj la ŝipo estas alligita ĉe la albordeĝejo de Split.

Korege nin akceptas splitaj samideanoj, en najbara gasteja salono enmanigas al ni la kongrespaperojn kaj kompleze gvidas nin al la diversaj hoteloj aŭ al komuna loĝejo.

### En Split (Spalato).

Vere belega peco da tero ĝi estas, tiu urbo de la II-a Sudslava Esperanto Kongreso — Split, laŭ karaktero preskaŭ itala, laŭ loĝantaro kaj lingvo kroata.

Ĝi staras sur ĉarma duoninsulo en Adriatiko, antaŭ ĉeno da altaj kalkmontoj.

Blua estas ĝia ĉielo, blua ĝia maro, blanka estas ĝia fundo formita de Dinaraj Alpoj, kaj blankaj estas ĝiaj domoj, preĝejoj kaj palacoj.

Palmoj oni trovas tie kaj agavojn, vinberujojn, orangojn, citronojn, figojn kaj tutan aron da aliaj fruktoj de l' benita sudo.

La urbo — afabia, malnova, parte konstruita sur la ruinoj de antikva palaco de roma imperiestro Diokleciano. La stratoj mallaŝaj, kaj mallaŝaj la fenestroj en la domoj, por ke la varmegaj sunradioj ne enpenetru tro forte la ĉambrojn.

Interesaj la preĝejoj — la katedralo estas parte restaĵo de la Maŭzoleo de Diokleciano. Ĝia turo, konstruita en la XIII-a jarcento, alte superstaras la urbon. Pitoreskaj la palacoj laŭ venecia stilo, pitoreskaj la placoj, la stratoj, la domoj, — ĉio.

Ĉarma la haveno kun la blankaj velŝipejoj kaj kun aro da etaj remboatoj. Ĉe la albordeĝejo kuŝas pli granda vaporsipo por pasaĝeroj.

Vigla la vivo en la banejo, kie cento da brunhaŭtaj viroj kaj virinoj sin banas en la ondoj de l' maro aŭ en la radioj de l' saniga suno.

Unika la granda ŝtuparo el tufblanka ŝtono kondukanta al pinombra monteto Marjan. Ĝin kreis en nelacigebla laboro kaj fervoro kaj kun



arta sento D-o Račić. Vere pentrindajn panoramojn oni ĝuas de sur ĝiaj terasoj.

Kiel tute alia estas ĉio ĉi tie ni! Nur iom post iom oni povas alkutimiĝi al tiu nova pejzaĝo, tiu alia popolo, tiuj fremdaj kutimoj, tiu diferenca kulturo. Oni devus resti pli longan tempon, por ĉion elkoni, ĉion kompreni, ĉion ĝui laŭ indeco. La vivkostoj ja ne estas altaj ĉi tie. Oni bezonas nur la duonon de la sumo, kiu estis bezona ekz. en Budapeŝto. Se oni restas por kelkaj semajnoj, oni povas ricevi bonan pensionon en privata domo jam por 60—80 dinaroj potage. Oni rakontis al mi, ke en Dubrovnik la vivkostoj estas ankoraŭ pli malaltaj. Sed eĉ se oni loĝas kaj manĝas en bona hotelo, oni povas en Split vivi per 150 dinaroj potage.

Bedaŭrinde estas, ke oni ne estas sufiĉe informita pri la kvalito de la hoteloj, precipe pri ilia pureco. Mi, ekzemple, preferas tre modestan sed puran loĝejon al luksa salono en hotelo, kie oni devas fumi la cimojn. En Split mi havis cimojn la unuan nokton, tial la duan tagon mi tuj transloĝiĝis al alia hotelo, kiu estis pura. Mi povas rekomendi ĝin al ĉiu vizitonto de Split. Ĝia nomo estas Hotelo Bellevue (Belvido). Kaj prave ĝi portas sian nomon; ĉar matene, kiam oni vekigaĝas kaj iras al la fenestro, oni povas rigardi sur placon surstaritan de palmoj, kaj iom turnante la kapon, oni vidas eĉ la bluan maron kun siaj ŝipetoj kaj boatoj; kaj vespere, antaŭ ol enlitiĝi, oni povas refoje jefi rigardon al ĝi. Tiunmaniere oni finas la tagon per agrabla impresoj kaj dormadas tiom pli dolĉe.

Pura estis ankaŭ la komuna loĝejo, separata por viroj kaj virinoj, kie la kongresanoj dormis en vicoj unu apud la alia kvankam sur pajlo sed preskaŭ senpage. —

Pri la sudslava kongreso mem mi nenion skribos. Oni legu pri ĝi la raporton de la splitanoj. Mi nur diru, ke miaj impresoj pri la kongreso estis la plej bonaj. La splitaj samideanoj faris ĉion kio estis en ilia povo, kaj — krom kelkaj negravaj erarotoj — ili bone sukcesis en la preparado de la kongreso. La kunsidoj en la festalono de l' teatro, la vesperoj en la Kazališna restoracio (la iom naiva filmprezentado certe okazis ekster programo kaj sen volo de la kongreskomitato) kaj la diversaj ekskursoj, pri kiuj mi raportos en speciala ĉapitro, estos ĉiam agrabla rememoroj por la kongresanoj, precipe la eksterlandanoj\*. Nur la himnon oni kantu estonte ne kiel funebran marŝon, kvazaŭ oni volus entombigi Esperanton, sed kiel freŝan, vere esperigan kanton.

Mi estas dankema al s-o Rupčić, la organizinto de la kongreso, ke li — per certaj vortoj kaj iom da ruzeco — sciis min loĝi al sia malproksima urbeto por partopreni la kongreson de la sudslavaj samideanoj. Mi estas dankema al li, kvankam mi devis oferi multe da dormo (ekz. sur la ŝipo de Sušak al Split aŭ dum la unua nokto en Split pro la neĝusta hotelo) kaj kvankam min atakis la de multaj prikanita kaj malbenita marmalsano dum unu el la belaj ekskursoj, kiujn ni faris kaj pri kiuj mi tuj raportos.

## La ekskursoj.

Trogir, Kaŝtela, Solin (24 aŭgusto), Biŝevo, Komiža, Vis, Hvar (25 aŭgusto), alveno en Gruž (26 aŭgusto).

Tutan vicon da ekskursoj anoncis la programo. La unua nin gvidis al miljaraj urbetoj Trogir (Traŭ) kaj Solin (Salona), dimanĉon la 24-an de aŭgusto.

Ni forlasis Spliton per malgranda vaporsipeo posttagmeze je 13.30 h. Unue nin kondukis la vojo al Trogir, kie ni rigardis kelkajn el la preĝejoj (oni rakontis, ke la malgranda urbeto posedas entute 21 preĝejojn), la Camerlengo-turon kaj aliajn vidindaĵojn, kiujn oni trovas priskribitaj en Baedecker.

Poste ni daŭrigis la veturadon al Kaŝtela (Sep kastelo), kie afabla ĉef-notario, kies nomon mi bedaŭrinde forgesis, gvidis nin tra la bela parko de sia vilaĝo, konstruita rekte apud la maro.

Fine ni alvenis en Solin (Salona), la dalmacia Pompejo, kiu estas unu vasta kampo de ruinoj devenantaj el la epoko de l' antikvaj romanoj.

La suno jam subiris, kiam ni atingis la ruinojn, kaj ju pli la tago cedis al la nokto, des pli dezerta kaj funebra aspektis la sennombraj restaĵoj de domoj, temploj, palacoj, tomboj, banejoj — la muroj, arkaĵoj, kolonoj, sarkofagoj. Terura sento de melankolio kaptis min, kiam mi estis vaganta tra tiu kampo de ruinaĵoj, atestanto de mortinta alta kulturo.

\* Krom mi, partoprenis la kongreson kiel eksterlandanoj du belginoj (s-ino Adam kaj f-ino Dourelingne), unu hino (s-o Won Kenn), unu franco (s-o Courtinat) kaj unu anglo (s-o Noël).


La nokto falis pli profunde, oni ne snuĝpili-ekkoni la kunulojn. Per alumetoj oni helpiv sos Silenteme ni iris nian vojon tra la dezertejo.

Subite iu longa ŝiriganta sono atingis nian orejon; ĝi sonis kvazaŭ vekrio de turmentata animo, kvazaŭ ĝemado de morte vundata homo, kiu frenezigaĝis pro dolorego — terura, tremetiga sono.

Estis tamen nur la sireno de nia ŝipo, kiu vokis nin por la forveturo. Sed en tiu loko de ruinoj, en tiu senkonsola dezertejo ĝi ŝajnis voĉo el infero.

Silenteme, pensiginte kaj palpante ni trovis nian vojon al la ŝipo, kiu en mallonga tempo portis nin returne al Split. —

La sekvintan matenon, lundon, 25 aŭgusto, ni levigaĝis jam tre frue. Je la kvina horo forportos nin la ŝipo al Biŝevo, la plej malproksima insulo en Adriatiko apartenanta al Jugoslavio.



Vaporsipo eliranta el Splita haveno.  
Kliŝo afable disponigita de societo „Jadranska Straza en Split“.

Mateno estas bela. Trankvila la maro. Klara la ĉielo. Tamen iom da moviĝo de ondoj ni certe havos. Kiu timas marmalsanon? Ankoraŭ la maro estas tute trankvila; kion vi volas? Ne timu, ĝuu la marveturadojn kaj la panoramon ĉirkaŭ vi!

Aro da sudslavaj gesamideanoj sidigaĝas kune. Ili ĉirkaŭas s-on Volković, del. de UEA en Doboĵ (Bosnio), kiu havas gitaron kun si.

Li ektuas la kordojn, belsonaj akordoj harmoniigaĝas. Kaj jam la aro komencas kanti melodion el la trezoro de l' popola kantararo kroata.

La kanto finiĝis, sekvas alia kaj ankoraŭ alia. Tute ne lacigaĝa la gaja gekantantaro, kaj eĉ ludo kaj kantoj rapide forpasas la tempo.

Estis por mi, eksterlandano, kiu komprenas apenaŭ unu vorton de la kroata lingvo, aparta ĝuo aŭskulti tiujn belajn popolokantojn, jen gajajn kaj supersprucantajn pro bonhumoro, jen malgajajn, melankoliajn, jen fajrajn, entuziasmigajn.

Ni atingis malpli trankvilan maron. La ondoj estas pli grandaj, la ŝipo balanciĝas pli forte. Kelkaj ekskursanoj malaperas en la salonon por kuŝiĝi, ĉar kuŝante oni ne tiom sentas la malbenindan sed tamen tiel interesan balanciĝadon.



Split vidata de monteto Marjan

Kliŝo afable disponigita de societo „Jadranska Straza en Split“.

Ni albridiĝas en Komiža sur insulo Vis (Lissa). Oni scias, ke tie en la jaro 1866 okazis la unua interbatalado de kirassipoj, en kiu la aŭstria admiralo Tegethoff venkis la italan ŝiparon. Post nelonga haltado ni daŭrigas nian veturadon al Biŝevo, kiu videbliĝas jam tute proksime.

Tamen dum tiu mallonga veturado el Biŝevo la marmalsano jam pruvas sian efikon. Kelkaj pasaĝeroj komencas „saluti la maron“ aŭ kiel sin esprimas nia fina samideano Kenn, kiu estas inter la unuaj viktimoj, „faras sian unuan ekzamenon“.

Mi miras, ke mi ankoraŭ nenion sentas. Mi iras en la salonon por rigardi, kiam kaj kiujn jam atakis la marmalsano. Nia kunulino de la unua nokto sur Adriatiko estas inter ili. Ŝi etendas al mi la manon adiaŭante. „Ni revidos unu la alian ĉu supre en la ĉielo ĉu profunde en la

tero!“ ŝi diras apatie. Tamen iu rideto de serĉemo flugegas trans ŝian vizaĝon. Do, ŝi ne mal-espervas. —

Kaj jen ni atingis Biŝevon. Nun ankaŭ la plej malesperintoj ekhavas novan kuragaĝon. Unu post la alia rapide forlasas la ŝipon kaj saltas en boton; ĉar nur per boato oni povas enveturi la miraklejon, kiun ni devos vidi — la bluan groton de Biŝevo.

Ses, sep boatoj estas, kiuj portas la esperantistojn. Per kelkaj remfrapoj ili atingas la enirejon en la groton, unu eniras post la alia.

Ĝardu vian kapon, ĉar la enirejo estas tre mallarĝa! Vi povus difekti vian kranion per la akraj ŝtonoj pendantaj desupre.

Sed jam vi havas nek bezonon nek tempon por sin gardi. Tutan atenton forprenas tiu sorĉa mirindaĵo, kiu subite ĉirkaŭas vin. Vi estas en a blua groto. Ĉu ion similan vi vidis en via tuta vivo? Ĉu vi ne kredas, ke la fabeloj, kiujn vi aŭdis en via infanaĝo, fariĝis vero? La akvo sub vi estas de nepskribebbla blueco, kaj tiel klara, tiel travidebla, tiel luma, ke vi ne povas kredi ĝin. Vi vidas en la profundo strangformajn rokajn, akvo kreskaĵojn, fiŝojn. Vi metas vian manon en la akvon — iuj ĝi fariĝas argenta. Vi prenas manplendon da akvo kaj gutetigas ĝin — ĉiu guteto ŝajnas esti pura perlo.

Supren sur rokon grimpas nudkorpa junulo. Li apartenas al tiuj insulanoj, kiuj estas kvazaŭ identaj kun la maro. Kaj de sur la alta roko li svingas sian nudan korpon tra la aero kaj atingas la klaran spegulon de l' akvo. Spegulo rompiĝas, akvo ekŝprucas, kaj milionoj da argentaj gutetoj briletas en aero. Kaj poste vi vidas la naĝantan korpon sub la akvo, iom strangforme ŝanĝitan pro la rompiĝo de la lumo sed tamen tute videblan.

Kaj aliaj sin jetas en la akvon, naĝas ĉirkaŭ niaj boatoj, sub ilin, dronas en la profundajoj kaj subite reaperas ĉe la supraĵo.

Tamen, kiam ili dum momento ĉesas naĝadon, la impresoj estas multe pli belaj, multe pli grandiozaj; ĉar la trankvila akvo estas travidebla kiel vitro, la tromovata akvo ne.

Vere feina estas tiu ĉi loko. Oni dezirus resti en ĝi tute sola aŭ eble en societo kun iu belkorpa akvonimfo, kiajn oni povis vidi en la bonejo apud la bordo de Split. —

„Ĉio havas finon“, diras proverbo, kaj bedaŭrinde ankaŭ nia vizito al la blua groto de Biŝevo devas havi finon. Nur nevolonte ni forlasas tiun lokon de sorĉo kaj ravo, por reveni al nia ŝipo.

Ni veturas returne al Komiža. Kiel jam dirite, estas nur mallonga veturado. Sed diable (por uzi vorton tre karan al kroataj samideanoj), dum tiu eta vojo ankaŭ min atakis tiu malbenita marmalsano.

Eble, ke mi ne povis digesti tiom da belegajoj viditaj en la lastaj tagoj; mia stomako ribelis kaj jen — silentas la ĝentila plumo.

Mi konsolis min per la penso, ke mi ne estas la sola bedaŭrindulo, kaj ke ni tre baldaŭ realigos la bordon de Vis.

En Komiža ni vizitis fabrikojn, kie oni preparas sardenojn, kaj poste ni havis bonegan tagmanĝon, konsistantan el supo, viando, fiŝo ktp. kun vino, por 25 dinaroj. Samtempe ni havis okazon gustumi delikatajn sardenojn kaj sardelojn donaciajn de fabrikelo „Sardina“.

Post la tagmanĝo mi profitis la okazon por danki al la jugoslavaj gesamideanoj, kaj precipe al s-oj Rupčić kaj Margetić, pro la taŭga aranĝo de la kongreso kaj de la ekskursoj, kaj al s-o Borčić de insulo Vis pro lia bona gvidado dum la ekskurso al Biŝevo kaj Komiža. Mi ja timis iri al Split, ĉar oni rakontis al mi, ke oni tie certe „splitigos“ mian kranion; sed nun mi ĝoias, ke mi sekvis la inviton de la sudslavaj samideanoj, ĉar mia kranio estas ankoraŭ tute sana kaj nur mia koro iom „splitiĝis“ kvankam en alia senco.

Ankaŭ s-o Won Kenn dankis kaj en tre humore plena maniero parolis pri la diversaj „salutoj al la maro“ kaj „ekzamenoj“ faritaj de li kaj de aliaj samideanoj dum la ekskursiva marveturado hodiaŭ.

De Komiža ni daŭrigis la veturadon al Vis, la ĉefurbo de la insulo, kie ni alvenis je 16 h. Tie ni estas akceptataj de la urbestro, kiu mem nin gvidis tra la urbeto. Interalie ni vizitis tie belan parkon, en kiu kreskas palmoj, laŭroj, oranĝoj, lemono, migdaloj, karoboj ktp. Oni povas tie aĉeti junan palmarbon jam por 60 dinaroj.

Post unuhora restado ni denove suriris la ŝipon por pluveturi al insulo Hvar (Lesina). Dum tiu veturado multaj samideanoj devis denove „pasigi ekzamenon“.



Tial, alveninte en Hvar, kaj ankaŭ pro la eksterorda ĉarmo de tiu urbeto, kelkaj deziris resti tie pli longan tempon. Sed fine ĉiuj kuraĝis ankoraŭ la saman vesperon daŭrigi la veturadon ĝis Dubrovnik resp. tuj hejmveturi al Split.

En Hvar troviĝas tre malnovaj fortikaĵoj, unu turo ekzemple estas konstruita antaŭ la naskiĝo de Kristo. Tie ekzistas ankaŭ la plej malnova teatro sur Balkano; ĝi estas konstruita en 1612. —

La ŝipo al Dubrovnik estis sufiĉe granda; kelkaj el ni trovis ankoraŭ lokon en kajuto, dume la ceteraj, inter ili mi, kuŝiĝis sur benkoj en la mangosalono.

Estis jam matene, kiam ni alvenis en Gruž (Gravosa), la haveno por Dubrovnik, ĉar la haveno de Dubrovnik mem sufiĉas nur por malgrandaj ŝipoj.

Dume kelkaj samideanoj ankoraŭ tiun ĉi matenon per la sama ŝipo daŭrigis la veturadon al Kotor (Cattaro), mi preferis kun malmultaj aliaj provizore resti. Kaj tiuj laste nomitaj eĉ denove dispartigis. Kun du gesamideanoj mi decidis resti en Gruž, kie granda, bonaspekta hotelo tuj apud la haveno invitis al restado; la ceteraj tramveturis al Dubrovnik por serĉi hotelon tie.

Teo Jung.

## La II. Sudslava Kongreso en Split.

22—25 aŭgusto 1924.

Vendredon la 22 aŭg. alvenis la ĉefa parto de la Kongresanoj per eleganta blanka vaporsipo „Zagreb“ je la 13 horo. Flirtis sur ĝi la verda standardo kaj forte batits la koroj sur la ŝipo kaj sur la marbordo. En la akceptejo tuj apud la elŝipiĝe-o komencis la interkonatiĝo; la Zagrebanoj tuj rakontis al ni, ke 9 eksterlandanoj kune alveturis. Gole pulsis niaj koroj, avido ni atendis premi iliajn manojn kaj interŝanĝi kelkajn vortojn.

Vespere je la 17 h. ni kolektiĝis antaŭ la Hotelo Bellevue kaj suprenrampis grandnombre la belan monton Marjan. Mallaciĝinte sur la unua pinto ni daŭrigis la vojon al la dua pinto, kie la meriplena D-o Jakša Račić, la fama majstro de Marjan, al kies senlacaĵoj kaj zorgoj oni devas danki la mirindan monumentan ŝtuparon kaj la tutan ĉarman aranĝon de la arbaro, atendis la kongresanojn. La prezidanto de Splitaj Esperantistoj prezentis lin al la samideano, poste prezentante al li la ĉefajn Esperantistojn el eksterlando kaj el Jugoslavio. De tie oni admiris la senkomparan panoramon, la maron, la ĉirkaŭaĵojn, la insulojn kaj la subirantan sunon. Neniu facile forgesos la unuan ekskurson de la Dua Sudslava Kongreso al la fina pinto de beleaga Marjan!

Je la 20 h. okazis la interkonatiĝa vespero ĉe kiu s-o Rupčić, la prezidanto de la Kongresa Komitato salutis la gastojn kaj kongresanojn. Tre impresis la parolado de hina samideano s-o Won Kenn kaj de Zagreba kunbatalanto s-o Rotkvić.

Agrable surprizis la kongresanojn la vespera eldono de la plej legata ĵurnalo en Split „Novo Doba“ kun bonveno al la Esperantistoj.

Sabaton la 23 aŭg. frumatene oni rigardis la urbon sub la tre afabla gvidado de la arĥeologoj D-o Abramić kaj D-o Grogin. Je la 10 h. en la flagornamita teatro okazis la solena malfermo de la Dua. En la festsalono viva movado, interparolado, reciproka prezentado. Sur la estrado pendas granda bela portreto de la maistro. La prezidanto de la Kongresa Komitato petis la anstataŭanton de la forestanta protektanto, urbestro D-o Ivo Tartaglia, malfermi la kongreson. Direktoro de virina gimnazio s-o Mangler, kiel anstataŭanton de la protektanto, salutis la reprezentantojn de granda, nobla ideo kaj en la nomo de la urbo Split, de la forestanta urbestro kiel ankaŭ de la tuta urbestraro, bonvenigas ĉiujn dezirante la plej agrablan restadon en Split kaj plej brillan sukceson al la kongreslaboroj. Li proklamas la kongreson malfermita.

La elekto de la prezidantaro donas jenan rezulton: s-o Rolf Rupčić, prezidanto, s-o D-o Teofil Velić, vicprezidanto, s-o Ante Margetić, sekretario kaj s-o Mihajlo Monić protokolistoj. Kiel honoraj prezidantoj rezultas elektitaj: s-ino Adeline Adan (Belĝujo), s-oj Won Kenn (Finio), Hagh Noel Nowell (Britujo), Léon Courinat (Francujo), Teo Jung (Germanujo) kaj s-o Roman Sakowicz (Polujo).

Poste la reprezentanto de la landestro Lerneja inspektoro s-o Petranović salutis la kongreson akcentante la gravecon de lingvo internacia en la lernejo kaj kulturo. Direktoro de poŝto kaj telegrafo Budisavljević atentigis pri signifo de Esperanto por la tuta mondo. Eksministro Biankini, tondre aplaudita, per entuziasmaj vortoj pentris la gravan signifon de nia ideo alportonta al la homaro eternan benon.

La vicprezidanto de Komerca Cambro Radica bondeziris fortan kunlaboron de komerco kaj Esperanto.

La prezidanto de kultura societo „Pučka Prosvjeta“ Fr. Ivanšević akcentis la potencon signifon de Esperanto kaj deziras al la Kongreso en ĉarma Dalmacio la plej bonan sukceson. La prezidanto de Ligo de privataj oficistoj, la reprezentanto de Cercle Franco-Yougoslave kaj de la Ligo de sudslavaj instruistoj same varme salutis la kongreson.

Sekvis la salutoj de la eksterlandaj samideanoj. S-o Won Kenn, la reprezentanto de la Centra Komitato de Esperanta Movado alportas la salutojn de UEA kaj de 400 milonoj da samlandanoj kiuj deziras interrilatojn kun Eŭropo.

S-o Leon Courinat parolis pri brila beleco de Dalmacio bedaŭrante, ke ĝi estas malmulte konata eksterlande kaj akcentis la fervoron de la nova franca registaro al nia afero.

S-o Teo Jung parolis pri la malbona opinio rilate al Jugoslavio eksterlande kaj pri lia ĝojo ke li povis proprokule konstati la kontraŭon. Kiel ĉefredaktoro de ET li promesis forigi tiujn malĝustajn informojn.

La kongreso rekomendis al la kursgvidantoj la propagandon de interna ideo inter siaj gekursanoj. Same oni instigis ĉiujn aktivajn laborantojn zorgi, ke ĉie okazu specialaj kursoj por la infanoj kiel ankaŭ por komercistoj dum la venonta laborperiodo.

Atentinda estas la zorgo al la nacia gazetaro. La samideanoj en Dalmacio faris per tio la plej bonajn spertojn kaj atingis per tio la plej bonajn sukcesojn. Dum la kongresaj tagoj la Splita ĵurnalo „Novo Doba“ tre amplekse raportis pri la kongreso, ĝiaj laboroj kaj gekursoj. Menciinda estas ankaŭ la semajna gazeto „Narodna Sviest“ en Dubrovnik, kiu regule enhavas Esperantan anguleton. Oni alprenis la deziresprimon ke ĉiuj samideanoj klopodu imiti siajn fratojn en Dalmacio.

La Trian invitis neniu grupo. Estis komisiita la Ligo pristudi la aferon kaj kunvoki almenaŭ por la venonta jaro teknikajn kunvenon.

Per „Gloro“ al la Majstro kaj kantado de l' „Espero“ finis la interesa laboro de la Dua Sudslava en Split.

Okaze de la II-a la Kongresa Komitato kaj la Turista Oficejo en Split eldonis belaspektan gvidfolion tra Split kun tre interesaj informoj por la turistoj.

La gvidfolio estas havebla de la Turista Oficejo en Split kontraŭ alsendo de 1 dinaro (= 1,5 sv. centimo), aŭ de gvidfolio aŭ gvidlibro de la urbo de la petanto.

Ĉiuj partoprenintoj de la II-a en Split (ankaŭ la eksterlandaj gastoj) estas petataj sendi eventualajn siajn plendojn aŭ rimarkojn pri iaj mankoj en la urbo Split, kiel ankaŭ en la ĉirkaŭaĵoj, sur la vaporsipoj, en la hoteloj kp. al la Turista Oficejo en Split.

### La unua konveno de Tutmonda Esperanto Asocio Junulara.

Dum nia Deksesa okazis la unuaj kunvenoj de la ĵus reorganizita T. E. A. J., kiuj kun sufiĉe granda sukceso finiĝis. La kunsidojn ĉeestis ĉirkaŭ 50 personoj, kies grandparto jam de longe estis la membro de tiu Junula Asocio.

Post la malfermaj vortoj de Rudolf Pivl, oni elektis laŭ propono de Andreo Rácz la novan estraron, konsistantan el R. Pivl, (Ĉeĥoslovakio), kiel prez., A. Rács (Hungarujo) kiel afergvidantan vicprez., Alfred Neupert (Germanujo) kiel administriston, krom ili ĉefdelegitoj de la Asocio el diversaj landoj, kiuj kune

formas la Centran Oficejon. Oni akceptis la novan regularon kaj laŭ ĝi elektis komitaton por la oficiala organo „Esperantista ĵurnalo“ kaj la ĉi poste eldonota „Esperantista Junulara Biblioteko“. Poste preparolis la interrilatiĝon kun aliaj asocioj.

### Neomaltusianismo kaj kulturo.

Al la raporto pri la kongreso devas ankoraŭ esti aldonata informo pri praktika parolado aktuala, kiu okazis la 8 aŭgusto en la meza ĉambrego de l' kongresejo F-lino St. Müller-Wien faris lumbild-paroladon pri „Naskolimo kaj kulturo“, kiun ĉeestis proksimume 75 personoj. Oni disdonis broŝuron pri „Neomaltusianismo kaj kulturo“ en Esperanto. Ĝi ankoraŭ nun estas havebla de la Eldonejo „Sexualreformo“, Gablenz 31, Wien XV/1 por 2000 a. kr. (Por mendoj de pli ol 50 ekzempleroj oni donas 20% da rabato.

## Kroniko.


Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scigiĝi (sur poŝtkartoj aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj sceligoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomi!).

### Eŭropo. Anglujo.

Barton, la Sept. En Barton sub la aŭspicioj de la League of Nations Union, s-o W. R. Wood, publika parolado, „La Ligo de Nacioj kaj la Instruado de Historio kaj Esperanto“.

### Jugoslavio.

Mostar. Je la 10 julio t. j. okazis la malfermkunsido de la esperanto klubo en Mostar kies prezidanto estas s-o Prof. Mohamed Behlivić. La regataj kunsidoj komencos dum la monato septembro. Poste ankoraŭ estos malfermita kurso.



Internaĵo de la blua grotto sur Biševo.

Kliŝo afable disponigita de societo „Jadranska Straza en Split“.

Poste salutis la kongreson ankoraŭ s-o Hagh Noel Nowell, s-ino Adeline Adam, s-o Roman Sakowicz, s-o Jan Fethke.

Post saluto de l' prezidanto de Esperantista Grupo en Zagreb D-o Domac sekvis la salutoj de la delegitoj de multnombraj grupoj en Jugoslavio kaj de izolaj esperantistoj.

La prezidanto de la Sudslava Esperantista Ligo en Zagreb D-o Maruzzi entuziasme dankis al ĉiuj ĉeestantoj kaj invitis al serioza laboro.

Prezidanto Rupčić fermis la solenan kunsidon fininta per kanto de la himno.

### La kongresa laboro.

Sekvis du kunsidoj sabaton posttagmeze kaj dimanĉe matene. Oni pritraktis kelkajn gravajn internajn demandojn, vigle diskutis kaj alprenis kelkajn decidojn. El la raporto de la Sudslava Esp. Ligo rezultas, ke 15 kluboj kun 602 membroj formas la Ligon. Dum la pasinta jaro estis gvidataj en Jugoslavio 21 kursoj kun 596 partoprenantoj. Dank' al la intereso por radiotelefono plifortigis ankaŭ nia movado en Zagreb, ĉar nia eminenta pioniro D-o Maruzzi, prezidanto de Sudsl. Esp. Ligo, fariĝis sekretario de Radio-Klubo en Zagreb. Bedaŭrinde ne ĉie estas rimarkebla konstanta progreso de nia movado. Al tio kontraŭstaras plej multe la nesperteeco de kursgvidantoj kaj la malhelpoj de la policaj aŭtoritatoj. Tio lasta devenas el la fakto ke la komencoj de nia movado en Jugoslavio trovis la plej favorajn grundon inter la laboristaro. La Dua akre kritikis la sintendon de la organo ke la ordo kaj unuanime decidis, ke la Ligo sin turnu al la kompetenta ministerio por forigi tiujn malagrablajn faktojn. Interalte oni decidis ankaŭ peti la Ministerion de Poŝto kaj Telegrafoj, ke oni permesu Esperanton ĉe la Telegrafado kiel kiaran lingvon. La demando de starigo de Esperanto Instituto en Jugoslavio estu prokrastita ĝis la



## Svisa Esperanto Societo (S.E.S.)

La ĝenerala jara kunveno por 1924 de la Svisa Esperanto Societo (S.E.S.) okazos dimanĉon 28. de septembro en Biel (Hotelo Bielerhof). Por eviti hotelkoston kaj ebli pli multnombrian partoprenon la centra komitato decidis ke la kunveno ne daŭros pli ol unu tagon; nur komuna tagmanĝo estos organizata.

Ĉiuj delegitoj kaj partoprenantoj bonvolu sin anonci antaŭ la 20 sept., skribante al la sekretariato, F-lino Diekmann, rue de Lyon, 66, Genève.

El la multaj demandoj enskribitaj en la tagordo, la plej gravaj estas: la okazigo de la XVII-a universala kongreso en Svislando kaj diversaj proponoj pri „Esperanto kaj Radio“.

## Praktika propagando.

### Propagando de hina samideano en Rumanujo kaj Ĉeĥoslovakio.

Je ĵuliofina kaj aŭgustokomenco la rumanaĵa esperantistoj akceptis la konatan orientan samideanoĝon — propagandiston, s-on Prof. D-o Won Kenn.

S-o Won Kenn vizitis en Bukaresto s-o ministron de la Publ. Instruado D-on Anghelescu, la eksterlandan ministron, la Direktion Ĝeneralan de la Polico, la redakcion de la gravaj rumanaĵaj gazetoj, ktp.

Nia eminenta samideano faris prelegon ankaŭ en la popola universitato de s-o Prof. N. Jorja en Valeni de Munte.

Ankaŭ la aŭtoritatoj, ankaŭ la gazetaro rumana — estis tre favore impresitaj per la vizito de s-o W. Kenn.

La 18. 8 s-o Won Kenn paroladis en Olomouc (Ĉeĥoslovakio) en la ĉambrego de Smetana parko antaŭ pli ol 300 personoj. Multaj devis foriri pro manko de loko. La parolado estis interesa eksperimento pri kiu la gazetaro raportis sufiĉe detale.

### Esperanto en „Internacia Unio por savi la infanojn“.

La „Internacia Unio por savi la infanojn“ (Union Internationale de Secours aux Enfants, 14 rue Massot, Genève), kies estraro favoras Esp., jam en 1923 publikigis sian konatan „Deklaracion de Genève“ krom en 35 naciaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Tiun jaron ĝi organizis en Genève someran interkonatigan renkontadon por siaj membroj: 300 gestudentoj (principe britoj) respondis jese al tiu alvoko kaj alvenis Genevon por ĉeesti dum du semajnoj prelegojn kaj kursojn organizitajn por ili en la Universitato (pri internaciaj kaj socialaj temoj, pri infan-edukado, franca lingvo, Esperanto, ktp.) Dum la malferma kunveno, Prof. Bovet, Direktoro de la Instituto J. J. Rousseau, faris anglalingve propagandan prelegon pri Esperanto 20 ĉeestantoj tuj enskribigis por la oficiala kurso kaj viziti ĝin regule ĝis fino. Tiun kursoŝperie gvidadis laŭ Berlitz-metodo, s-ino Umanski, vic-prez. de la geneva Esp. grupo; kaj la lastan tagon de tiu sukcesplena kurso, (14 aŭgusto) ĉiuj glerantoj vizitis la C. Oficejon de UEA kaj 5 el ili aliĝis kiel membroj al UEA. Ni gratulas tiun gravan organizaĵon pro ĝia iniciatema provo, kiu certe konvinkos multajn personojn pri la taŭgeco de nia lingvo. Aliaj organizaĵoj sekvu tiun laŭdindan ekzemplon!

### TEKA.

**Korekto:** En la N-o 207 de ET la adreso de D-o Crlenjak en la Raporto de Teko kaj en la Alvoko al la kuracistoj ne estas korekte presita. Ĝi estas: D-o Milan Crlenjak, Zagreb (Jugoslavio), Palmotiĉ ul 20 I.

## Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laci disponebla loko estas lojale enpresitaj ĉiuj sciigoj, informoj, kritiko, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuala refuzi netaŭgajn artikolojn.

### Pri la vortoj Brodkasti kaj Disaŭdigi.

Oni informis min, ke la germanoj malsatas la vorton Brodkasti, ĉar la vorto ĉe ili signifas „pankesto“, kaj preferas la kunmetitan vorton Disaŭdigi, kiun vorton mi jam vidis en ET, kaj aliaj gazetoj.

Tiu lasta estas tute malbela kaj nevera vorto, ĉar ĝi ne klarigas ĝuste tion, kio vere okazas, kiam radio-stacio elsendas signalojn. La fakto, ke stacio elsendas signalojn, ne signifas, ke tiuj signaloj estas aŭdataj! En multaj lokoj ili ne estas aŭdataj; tio dependas de la distanco kaj forto de la ricevarato. Do, disaŭdigi estas malĝusta.

Oni povus diri Dissendi aŭ Disvastiĝi, sed tiuj kunmetaĵoj estas malbela kaj ne uzindaj; same kiel la malnova negativa vorto „senfaden“ (wireless — L. S. D.) anstataŭ la moderna vorto „radio“. Brodkasting estas vorto, kiu nun estas preskaŭ universala, ĉerte multaj lingvoj enkorpiĝis ĝin en siajn vortarojn, eĉ sensange, kaj ĉar tiu vorto havas sencen, kiu ne estas ĝuste tradukebla en aliaj lingvoj, ĝi estas la plej bona vorto por Esperanto. Malgraŭ ĝia eble neagrabla senco germana, mi opinias, ke ĝi kaj ne alia vorto devus esti la vorto uzata en Esperanto. Ne forgesu, ke en Esperanto estas multaj vortoj, kiuj estas malagrablaj al la oreloj de iuj nacioj, kaj se oni elprenas el Esp. ĉiun tian vorton, nia vortaro eble fariĝus nur skeleto!

H. E. Epton. (I. R. A.)

*Rim. de la Red.* La rezonoj de nia Satata samideano Epton ne estas konvinkigaj. Estus vere, ke multaj lingvoj komence ekentis simple la vorton Brodkasting dum la tempo, en kiu la angla kaj amerika radio-movadoj estis preskaŭ solaj. Post kiam la radio-movado disvastiĝis ankaŭ eĉlande kaj rezultis klarigi al enlandanoj la sencen de la vorto Brodkasting prave kaj rajte (de l' nacilingva vidpunkto) plifortigis la emon havi specialan vorton en sia nacia lingvo. Tiun fakton konfirmis mia radio-konferenco en Genève kelkaj kompetentaj samideanoj de ne malpli ol 8 grandaj nacioj eŭropaj kaj speciale nia samideano Won Kenn, dirante, ke ankaŭ la hina lingvo havas vorton formitan el propraj radikoj. Fine oni decidis por „disaŭdigi“. Kompreneble oni povas ankaŭ diri „dissendi“.

La rezonoj de s-o Epton krome enhavas du neklogikajn. Se la vorto „disaŭdigi“ ne estas ĝusta, ĉar multaj lokoj ne estas atingataj per iuj kazoj, la vorto „vidigi“ (kaj la senfinaj serio de ig-vortoj) estas neĝusta, ĉar multaj personoj ne vidas tion, kio estas vidigata eble ĉar ili ne rigardas aŭ ne interesiĝas pri la vidigataĵo. Due, se la vorto Brodkasting havas sencen, kiu ne estas ĝuste tradukebla, ĝia kripligita posteulo taŭgas ankoraŭ malpli por esti uzata en internacia helplingvo. „Disaŭdigi“ kaj „dissendi“ estas naturaj kaj simplaj formoj de nia elementa lingvo kaj pro tio estas ekskluzive taŭgaj por la praktika uzo.

Se „brodkasting“ tamen estu uzata, ĝi nur povas koncerni la anglan sistemon de „Brodkasting“, kiu teknike diferencigas de aliaj sistemoj sur la kontinento. R. Kr.



Foiro de Frankfurt  
INFORMOJN: MESSAMT  
(ESPERANTO-FAKO)  
FRANKFURT A. MAIN

## Ildoj de Orfeo.

Originalo romano de  
**H. J. Bulthuis**  
(Rekomendita de E.L.A.)

Havebla en la konataj esp. libroj en London, Paris, Antwerpen, Berlin, Dresden, Leipzig, Stockholm, Helsinki, Habana ktp. kaj en la Centra Esperanto Librojo, Bankaŝtraat 2 a s' Gravenhage. (Prezo: ĥol. guild. 2.25, piligitaj por 0.65 por la kosto de afranko kaj poŝta rekomendo)

## Novaj tempoj.

Gazeto de la esperantista instruistaro, propagandas novan pedagogion, perlaboran lernejon kaj perlaboran pacon. Petu specimenon de:

**M. Goldberg, Leipzig-Co.**  
Kleinmstr. 14. Kleinmstr. 14.

La plej granda marbanojo sur Adrio  
**Kupari apud Dubrovnik (Ragusa)**  
400 m sabla marbordo - 220 elegantaj ĉambroj  
Bonega kuirejo  
Ĉiutagaĵaj koncertoj - Amuzoj - Sporto  
Propaĵo de  
**Dobrovacko Kupalismo i Hotelso D. D.**  
(Dubrovniko Baneja kaj Hotelo Akcia Societo).

## Fotobildoj de la Wiena Kongreso.

Kolekto kontraŭ antaŭpago de  
2.— germ.  
ormarkoj  
(resp.  
alia  
valuto)  
havebla ĉe

**Lumbildoficejo**  
**Jul. Gross,**  
Berlin N. O. 18,  
Friedenstrasse 63.

## Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naŝiko, flandigo, edzigo, morto, okazintaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage. Aliaj anoncetoj, nur akceptitaj por minimume du sinkvialaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 30 vortoj (krom unu adreso) la prezo de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭpago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkomo, ĝuas por propraj anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.— mk., prefera prezo por postlabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

**ORGENISTOJ.** Mi petas poŝtkarton kun bildo de via orgeno, volonte kun priskribo. Mi resendos senprokraste tiun kiun mi ludas. — C. M. Vißsers, orgenisto, Klundert (N. Br.), Nederlando. [2]

**VINOJ GERMANAJN KAJ EKSTERLANDAJN** vendas L. Weinschenk, Zollhafen, Mainz, Germanlando. Oni postulu ofertojn. Reprezentantoj estas serĉataj. [2]

**VI POVAS PERLABOR! 25% diskrete, ludfacile.** Oportuna negena, solida afero. Ne plaŭn kostojn. — Detaloj 1 sv. fr. aŭ egalvaloro. — S-ino Louis Seitz, Regensburg (Bayern) Prebrunn-Deize 5. [2]

**BONAN RABATON.** Mi deziras, vendi 55 il. libroj de Thora Goldsmid al firmao aŭ persone, kiu povas pagi tuj post la ricevo. Adreso: Delegito Megda Mammen, Grenaa, Danujo. [2]

Le „Rondeto de Esp-istoj en Bobruisk“ amike petas ĉiujn Esp-istojn, kiujn interesas Esperanto-movado en Rusujo, por helpe organizi la ekspozicion, sendi objektojn, kiuj estas interligitaj kun Esperanto. Sendigojn direktu al: s-o Johano Gajdukieviciĉ, Lukskaja str. 12, Bobruisk, Ruslando aŭ al Sussi Valkovskaja, Socialističeskaja str. 198. [2]

### Korespondo kaj Interŝango.

Letervesperon aranĝos la duan de oktobro Laborista Esperanto-Societo en Lwow (Polujo). Adreso de sekretario: Rudolf Dvorak, Lwow-Zamarsynow, Ogrodnicka 685, Polujo. [2]

S-o Hans Löbel, Turnersr. 25, Glauchau (Sa.), Germanujo, deziras korespondi per il. PK kaj L, ŝanĝi post-interkonsento musikaĵojn, iel sukcesintajn. [2]

Societo anonima Canninga & de Koster, Acaciaŝtraat 176, s' Gravenhage, Nederlando deziras korespondi kun la tuta mondo kaj ŝanĝas PM, PK il., gazetojn, sport-jurnalojn, fotojn ktp. [2]

S-o Antonio Balaz, Telegrafa Centro, Sta. Clara, Kubo, Antiloj, deziras interŝanĝi il. PK kaj L kun gesamideanoj de Svislando, Grekujo, Turkujo, Danujo, Portugalujo, Svedujo kaj ekstereŭropanoj. Mi ĉiam respondos. [2]

S-o Max Lepczynski, Köln, Germanujo, Bürgerstr. 9, deziras korespondi per il. PK kaj L kun fraŭlinoj de la en- kaj eksterlando. [2]

S-o Oskar Flad, Darmstädterldstr. 81, Frankfurt a. Main-Süd p. k. & L. kun ĉiuj landoj, speciale kun libristoj kaj eldonistoj. Respondas nepre! [2]

3 junaj Esperantistoj, s-o Pöhlisen, ĉe Hellemann Nielsen, s-o Olaf Jensen, ĉe redaktoro Jensen, s-o B. Baden, 24 jara skolto, ĉe Messen, ĉiuj en Grenaa, Danujo deziras korespondi per interesaj PK aŭ L. Por la tuta respondo garantias la Delegito de Grenaa. [2]

S-o Giuseppe Giolla, Via Fabio Filzi 50, Milano XXXI, Italujo, deziras interŝanĝon de poŝtkartoj kaj papermono, poŝtkartoj (se eble poserie) artaj revuoj kaj libroj. Nepre frue respondas al ĉiuj. [2]

S-o Karlo Schnabl, Grossarl (lando Salzburg), Aŭstrio, vera Esp-isto, deziras korespondi per il. PK kun la tuta mondo. [2]

S-ino V. Hidassy, Csónak utca 15, Budapeŝt II, Hungarujo, deziras korespondi kun inteligentaj gesamideanoj, escepte ĉeĥoj [2]

S-o Jozefo Lakrzewski, str. Vilenska 41-21, Warszawa, Polujo, deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo per il. PK kaj L. pri diversaj temoj. [2]

Rechtsrat Hubert Weinberger (jura konsilisto) Geigerstrasse, Rosenheim i. Bay. (Germanlando) deziras korespondadon per il. poŝtkartoj (markoj bildflankaj) kaj interŝanĝon de PM kun la tuta mondo, escepte kun germanlingvanoj. [1]

Telegramoj: Velox—Split.

Interurba telefono n-o 3—60.

**Armand Nikolić**  
**marista komerca agento Francuska obala 2, Split, (Spalato) Dalmacio.**  
Internaciaj ekspedoj - Limdepaĝa prilaboro - Perado ĉe la ŝliulo - Reprezentadoj Asekuroj - Entrepreno ĉe la en- kaj elŝipigo.

Kunlaborantoj: M. Sinovčić, limdepaĝa peranto, A. Ĉulić kaj S. Lisičić maraj leŝtanantoj kaj agentoj.  
Kuranta konto ĉe: Bosanska Industr. Trgovaĉka Banka en Split.

## Società Maritima Adriatica

Telegramoj: Agedriatic. Centro en Genova. Telefono 62-45

Agentoj: Savona - Livorno - Spezia - Napoli - Palermo - Catania  
Bari - Brindisi - Barleta - Trieste - Fiume.

Internaciaj maraj transportoj - Perado ĉe ŝliulo - Ŝipekipo.

Reprezentanto por Jugoslavio: **Armand Nikolić, Split**

Telegr. Velox.

Interurba Telef. 3-60.



# Konstanta reprezentantaro de la naciaj societoj (K. R.) konsistanta el unu reprezentanto de ĉiu Nacia Societo Esperantista.

(Starigita laŭ decido de la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto /Helsinki 1922). Adr. por ĉiuj komunikajoj: 21 Russellcroft Road, Welwyn Garden City, Anglujo.

## Raporto al la Deksesa Kongreso en Wien.

Por doni sekvon al la decidoj de la Kongreso de Helsinki, reprezentantoj de 21 Naciaj Societoj kunsidis dum la Kongreso en Nürnberg, kiam oni legis la raporton de la Provizora Prezidanto de Konstanta Repraesentantaro, Generalo Seberr. Tiu kunveno ankaŭ elektis estraron, nome: Honor-prez. Generalo Seberr; Prez. s-o John Merchant; Sekr.-kasisto s-o Charles H. Edmonds. Samtempe oni akceptis liston de proponitaj anoj de la Centra Komitato, nome: Kenn, Page, Dietterle, Hromada, Chavet kaj Privat. La kuna elektanto de Centra Komitato — UEA — konfirmis tiun liston. La kunveno studis la financon problemem. En Helsinki oni preparolis bazon per kiu ĉiu Nacia Societo pagus por ĉiu membro unu dekonon de ordinara individua kotizo al UEA. Diversaj malfacilaĵoj malhelpis la akcepton de tiu principo por la momento kaj tial por la unua jaro (1925) la kunveno decidis, ke la Naciaj Societoj pagu laŭ kapablo kaj bonvolo kiel eble respektante la principon de Helsinki.

Acceptinte la oficojn per kiuj la kunveno en Nürnberg bonvolis nin honoriri ni submetis la decidojn de ĉiu kunveno al la konfirmo de ĉiu Nacia Societo per nia cirkulero 1-a de la 14 novembro 1923. Formale konfirmis la decidojn 21 Naciaj Societoj. Krome, 8 aliaj, ne uzinte la demandaron dissenditan, ne respondis pri tiu punkto sed per posta aliĝo aprobis la decidojn.

Tiu cirkulero 1-a plue petis la Naciajn Societojn pagi kiel eble plej baldaŭ kotizojn por la jaro 1925. La listo de pagintaj Societoj estas la jeno:

Nomo de la Societo	Membroj	Sumo pagita	Sumo tenata
Svisa E. S.	550	Sv. Fr. 100	£ 31.95
Brita E. S.	1200	£ 300.00	£ 30.00
Pola E. S.	100	Pol. M. 5000000	£ 5.00
E. S. de Finnlando	228	F. M. 250.80	£ 1.88
C. Dana E. L.	225	D. Kr. 114.50	£ 4.37
Itala E. F.	800	I. Liroj 100	£ 19.40
Brazila E. S.	210	Fr. Fr. 200	£ 210.50
Kalifornia E. S.	40	U. S. Dol. 4	£ 18.10
Aŭstralazia E. A.	172	£ 2.20	£ 2.20
Ceĥoslovaka A. E.	600	C. Kr. 500	£ 5.26
G. E. L. en Ceĥoslovakio	1000	C. Kr. 100	£ 15.00
Nederlanda S. E.	500	N. Florenoj 75	£ 6.89
Sveda E. F.	520	Sv. Kr. 50	£ 219.80
Franca (S. F. P. E.)	?	Fr. Fr. 146.50	£ 1.19
Bulgara E. S.	600	Sv. Fr. 50	£ 119.50
Aŭstralia E. D.	?	£ 20.00	£ 20.00
E. A. de Esionio	400	E. M. 810	£ 9.00
Donacita de s-o Edmonds			£ 1.50
			£ 66.18
Deprenu koston de leterpapero, kovertoj, cirkulero, poŝtelspezoj			£ 1.50
Neta sumo restanta je eventuala dispono de Centra Komitato rilate al la jaro 1925			£ 65.88

Du Societoj promesis pagi sumon por la jaro 1925, sed ĝis nun ne tion faris.

Anoncis sin pretaj pagi por la jaro 1924 (sed ne por la jaro 1925) Japana E. L., Germana E. A., Kataluna E. F., Hungarlanda E. S., Riga E. S., Rumana E. S., Norvega E. L. kaj Litova E. A.

La cirkulero 2-a, elsendita je la 1 marto 1924 anoncis la konfirmon de la Estraro de K. R. kaj de la anoj de Centra Komitato. Tiu cirkulero ankaŭ aivokis la Naciajn Societojn al partopreno en 1. komuna kunveno de K. R., UEA (elektantoj de C. K.); por diskuti la sekvojn de la Kontrakto de Helsinki, precipe rilate al rimedoj por pli intima kunlaborado inter UEA kaj la Naciaj Societoj; 2. konferenco de Naciaj Societoj por aranĝi detalojn pri eksperimenta instruado de Esperanto al diverslandaj komercistoj; 3. kunveno de K. R., por diskuti pri diversaj internaj aferoj, ekzemple, bazo de kotizo, voĉdonsistemo, financa jaro, ktp.

La kunvenoj okazis en Ĝenevo je Pasko kaj plena protokolo pri ili aperas en „Esperanto“ majo 1924 (komp. ankaŭ ET 192, 18. 5).

La decidoj de la aparta kunsido de K. R. pri internaj aferoj estas la jenaj:

La financa jaro de K. R. komencas kun kalendaro jaro, sed la Societoj devas pagi sian kotizon antaŭ la 1 julio, alimaniere ili ne rajtos voĉdoni depost tiu dato ĝis ili pagos.

Por la kuranta jaro la kotizo de Naciaj Societoj estas fiksata je 10 procentoj de la UEA kotizo (simpla membro) por ĉiu membro de la Societo.

La Societoj kiuj ne povas pagi tiam rajtos pagi pli malaltan kotizon je minimume la duono, sed kun proporcia malpliigo de la voĉdonrajtoj. Por ne fermi la pordon al Societo, la Estraro de K. R. povas escepte fiksi por unu jaro kotizon sub la

minimumo, interkonsentante kun petinta Societo. Tiam la voĉdonrajto estos ankaŭ proporcie malpliigata. La Estraro tion faru nur post atenta esploro de la cirkonstancoj.

Intertempe, ĉiuj Societoj pristudu la demandon pri estonta pli definitiva pagsistemo kaj sendu pri tio koncizajn opiniojn al la Estraro de K. R., por ke oni povu prezenti la tutan aferon kiel eble plej klare dum la Kongreso en 1925.

En la komuna kunveno de K. R. kaj UEA, okazis diskuto pri artikolo 4 de la Kontrakto de Helsinki, kiu rilatas al la organizo de la Universalaj Kongresoj. Post plena diskuto la jena nova teksto estis akceptata per alvoka voĉdono por la modifita artikolo 4:

„La Centra Komitato okazigas la Universalajn Kongresojn kaj komisiis ilian lokan arangan al loka organiza komitato.“

La komuna kunveno decidis, ke tiu proponata ŝanĝo devas esti poste submetata al balota konfirmo skriba de K. R. kaj UEA.

La Cirkulero 5-a sub dato 14 junio 1924, petis la Naciajn Societojn konfirmi la decidojn de la konferencoj en Ĝenevo kaj samtempe voĉdoni pri la proponata ŝanĝo en la Kontrakto de Helsinki. Pri la respondoj ni raportos detale dum la Kongreso mem, kiam ni ankaŭ raportos pri la kotizoj jam pagitaj ĝis tiu dato por la jaro 1924.

Dankante la Naciajn Societojn por ilia helpema subteno, ni esprimas la deziron, ke en K. R. ili trovu la necesan ilon por pli intima kunlaborado por la progresigo de nia afero ĉiulande.

John Merchant,  
prezidanto.

Charles H. Edmonds,  
sekretario-kasisto.

## Protokolo de kunvenoj de K. R. dum la Deksesa en Wien.

La unua kunsido de la K. R. dum la Deksesa okazis en Konzerthaus, Wien, la 7 aŭgusto 1924.

Prezidas: S-o John Merchant, prezidanto de K. R., kiu malfermas la kunsidon per alvoko al la reprezentantoj anonci sin.

Anoncas sin la jenaj:

- Brita E. A. S-o John Merchant
- Ceĥoslovaka A. E. Prof. D-o Kamaryt
- G. E. L. en Ceĥoslovakio S-o Taubmann
- Danziga E. A. S-o Aeltermann
- C. Dana L. S-o Blicher
- Franca (S. F. P. E.) S-o Poncet
- Germana E. A. S-o D-o Steche
- Nederlanda S. E. S-o Isbricker
- Itala E. F. S-o Reni
- Kataluna E. F. S-o Sola
- Rumana E. S. S-o Fischer
- Hispana (Federacio Zamenhof) S-o Mangada-Rosenörn
- Svisa E. S. D-o Privat

La Sekretario-kasisto atentigas, ke Danziga E. A. kaj Hispana Federacio Zamenhof ne rajtas voĉdoni en la kunveno, ĉar tiuj du Societoj ne pagis la kotizon por 1924.

La prezidanto memorigas la kunvenon pri la propono fari ŝanĝon en artikolo 4 de la kontrakto de Helsinki.

Tiu propono estas farita en la komuna kunveno de K. R. kaj U. E. A. en Ĝenevo je Pasko kaj poste submetiĝis al skriba voĉdono de la Naciaj Societoj.

Ĝia la 1 julio ĉiu Societo rajtis voĉdoni pri la propono, sed depost tiu dato nur la Societoj, kiuj pagis la kotizon havas tiun rajton. Li petas, ĉu iu reprezentanto ricevis instrukciojn voĉdoni pri la propono en la nuna kunveno laŭ la kvara cirkulero de la estraro.

Kelkaj reprezentantoj utiligas la okazon kaj poste la sekretario-kasisto legas la liston de aprobintaj societoj jene:

Brita	1200	voĉoj
Svisa	200	"
Itala	150	"
Saarteritoria	?	"
Estona	?	"
Nederlanda	300	"
G. E. L. en Ceĥoslovakio	350	"
Hungara	?	"
Aŭstra	?	"
Ceĥoslovaka A. E.	250	"
Rumana	220	"
Kataluna	250	"
Dana	200	"

Li anoncas, ke Germana E. A. deziras lasi la proponon ĝis nova diskutado en la nuna kongreso. S-o D-o Steche reprenas tiun deziron kaj

anoncas, ke G. E. A. hodiaŭ konsentas kaj oni fial aldonas ties nomon al la listo, kun voĉoj 82.

S-o Mangada-Rosenörn anoncas, ke Hispana Federacio Zamenhof, ankaŭ aprobas la ŝanĝon.

S-o Poncet plendas, ke pro tio ke Franca S. F. P. E. ne ricevis tagordon por la nuna kunveno, li ne ricevis instrukciojn.

La Sekretario-kasisto atentigas, ke la cirkulero de K. R. estis sendita al S. F. P. E., ĉe 51 rue de Clichy, Parizo, kaj la bonan ricevon de tiu cirkulero pruvas la fakto, ke la Kasistino de S. F. P. E. respondis al li pri alia ero en ĝi. Li ankaŭ atentigas, ke ĉar S. F. P. E. nur pagis la kotizon en tiu sama tago, ĝi eĉ ne rajtis ricevi la cirkuleron. La prezidanto demandas, ĉu s-o Poncet povas voĉdoni pri la propono, kaj s-o Poncet respondas, ke li devas sin deteni, ĉar li ne ricevis instrukciojn.

D-o Privat proponas, s-o Prof. Kamaryt subtenas, kaj ĉiuj konsentas, ke la Naciaj Societoj devos elekti reprezentanton, kies adreso valoras por ĉiu okazo.

D-o Privat poste anoncas, en la nomo de U. E. A., ke U. E. A. ankaŭ akceptis la proponitan ŝanĝon kaj komunikis la decidon al Centra Komitato. Kiam Centra Komitato ricevas la komunikon de la Estraro de K. R., pri la akcepto, la ŝanĝo fariĝos valida.

Oni legas leteron de s-o Warden, prezidanto de Konstanta kongresa komisiono pri la proponita ŝanĝo, sed konsentas, ke la kontraŭstaro de s-o Warden pri la propono devenas de neĝusta interpreto de la faktoj.

La reprezentantoj decidas denove kunveni la 9 aŭgusto je la 11 a horo.

La dua kunsido de K. R. okazis la 9 aŭgusto 1924 je la 11 horo.

Prezidas: S-o John Merchant, prez. de K. R.

Anoncas sin la jenaj reprezentantoj:

- Brita E. A. S-o Merchant
- Ceĥoslovaka A. E. Prof. D-o Kamaryt
- G. E. L. en Ceĥoslovakio S-o Taubmann
- C. Dana L. S-o Blicher
- Franca (S. F. P. E.) S-o Poncet
- Germana E. A. S-o D-o Arnold
- Hungarlanda E. A. S-o Balkanyi
- Itala E. F. S-o Reni
- Kataluna F. F. S-o Sola
- Latvia-Riga E. S. S-o Bergtals
- Nederlanda S. E. S-o Isbricker
- Pola E. S. S-o Kostecki
- Rumana E. S. S-o Fischer
- Svisa E. S. D-o Privat

La sekretario-kasisto legas la protokolon de la unua kunsido kiun oni unuanime akceptas.

La prezidanto legas kopion de letero, kiun la estraro hieraŭ transdonis al la Centra Komitato, laŭ la jena teksto:

Sekve de la komuna konferenco de K. R. kaj U. E. A. en Ĝenevo je Pasko, kiu akceptis proponon pri ŝanĝo en la kontrakto de Helsinki, nome, ke la nova teksto de paragrafo 4 de la kontrakto estu: „La Centra Komitato okazigas la Universalajn Kongresojn kaj komisiis ilian lokan arangan al loka organiza komitato“, ni havas la honoron komuniki al vi, ke la estraro de K. R. submetis tiun proponon al la skriba voĉdono de la Naciaj Societoj kun rezulto ke 15 societoj ĝin aprobis. Unu societo sin detenis de voĉdono, kelkaj ne voĉdonis.

Ni memorigas al vi, ke K. R. kaj U. E. A. estante la du kontraktintoj havas plenan rajton fari ŝanĝon en la kontrakto, de Helsinki, do, kiam vi havas similan aproban komunikon de U. E. A. la ŝanĝo fariĝos definitiva.

Post unuanima aprobo de tiu letero, D-o Privat, la prezidanto de Centra Komitato, konfirmas ĝian ricevon kaj anoncas ke li ankaŭ ricevis la aproban voĉdondon de U. E. A. Tial de nun Centra Komitato funkcios rilate al la Universalaj kongresoj, sed pro persona estimo al s-o Warden oni deziras ke li daŭre agadu dum la nuna kongreso.

D-o Privat, ankoraŭ kiel prezidanto de Centra Komitato, sciigas ke s-o Chavet akceptis el membreco de la Centra Komitato.

La sekretario-kasisto legas leteron de s-o Chavet al la estraro de K. R. de 16 februaro 1924, sciligante pri lia ekŝigo. La kunveno esprimas koran bedaŭron pri la ekŝigo de s-o Chavet, kiu antaŭ la milito faris multon por la movado, kaj kiu eĉ dum la malfacilaj postmilitaj tempoj faris sian ebilon.

La prezidanto atentigas pri la sistemo de elekto de anstataŭanto, nome, ke la elekto estas komuna afero de K. R. kaj U. E. A. Estos necese submeti nun proponitan nomon al nomojn al skriba voĉdono de la Naciaj Societoj. Li petas proponojn.



S-o D-o Dietherle proponas, ke la nova membro ankaŭ estu franca. Li dankas al la francaj pioniroj de la movado kaj opinias ke pro diversaj celoj, interalie pro propagandaj celoj, nia Centra Komitato devas enhavi francojn.

D-o Privat komunikas, ke s-o Chavet proponas la elekton de s-o Warden.

S-oj Merchant kaj Edmonds subtenas D-on Dietherle. Kvankam la ses membroj de Centra Komitato ne estas elektataj laŭ nacieco, ne estas bone ke du britoj troviĝu inter la ses membroj. Troviĝas ankaŭ en Francujo agemaj laborantoj por la movado. S-o Edmonds proponas la nomon de s-o Rollet de l'Isle.

S-o Hromada subtenas tiun proponon pro la du kaŭzoj nomitaj de D-o Dietherle.

La Prezidanto petas la opinion de UEA.

S-o Rockmann, en la nomo de la Komisiono de UEA, diras ke UEA konsentis principe, ke franco anstataŭ la ĝisnun sidintan francojn, sed rezignis pri propono de nomo. Ĝi, do, volonte konsentis la proponon de K. R.

S-o Soia subtenas la ideon, ke la nova membro estu franco, sed deziras la opiniojn de la Franca Komitato.

La Prezidanto petas s-on Poncet por la opinioj de la francoj.

S-o Poncet dankegas al s-o D-o Dietherle ne nur por la propono pri franco sed ankaŭ por la afablaj vortoj per kiuj li esprimis ĝin. Li ne povas esprimi opinion de la Franca Komitato pri la nomo, sed persone scias ke s-o Rollet de l'Isle havas grandan laborkapablon kaj taŭgas por la ofico.

La Prezidanto atentigas, ke ne la britoj faris la proponon pri s-o Warden, sed franco. La britoj certe ne ŝatus havi en la Centra Komitato du personojn el ilia nacio, kaj krome, li estas certa ke s-o Warden ne akceptus pro la ŝama kaŭzo.

Oni voĉdonas pri la demando ĉu aŭ ĉu ne elektit alian francojn, kaj unuanime konsentas, ke la nova membro estu franco.

La Prezidanto petas, ĉu oni deziras proponi alian nomojn krom tiu de s-o Rollet de l'Isle. Neniuj proponoj alvenas, kaj oni tial voĉdonas pri la nomo de s-o Rollet de l'Isle, kaj unuanime akceptas la proponon.

La Sekretario-kasisto starigas la demandon pri elekto de nova Estraro, atentigante ke la Kontrakto de Helsinko mem ne difinas periodon, kaj ke kiam oni elektis la nunan Estraron en Nürnberg oni ne limigis la periodon de ĝia agado.

D-o Privat diras, ke la Centra Komitato interpretas la saman periodon por la Estraro de K. R. kiel por la Centra Komitato, nome, tri jaroj. Tamen, kiam K. R. starigas sian internan regularon, kion ĝi devas fari laŭ la Kontrakto de Helsinko, ĝi povas difini periodon. Intertempe li proponas ke la nuna Estraro daŭrigu sian agadon, kaj ĉiu konsentas pri tio.

La Prezidanto dankas en la nomo de la Estraro por la fido montrata en ĝi, kaj certigas el sia propra sperto en la movado en Britujo, ke en la juna Sekretario-kasisto de K. R. oni havas efektive grandan laboranton kiu neniel ŝparos sin en la penado sukcesigi la novan organizon. Tiu Sekretario-kasisto estas efektive ekster la reprezentantoj mem, kio estas permesata laŭ la Kontrakto de Helsinko, kaj scias agadi senpartie kaj nepersonale. Tiujn vortojn de la Prezidanto la reprezentantoj aplaŭde subtenas.

S-o Edmonds, la Sekretario-kasisto, kortuŝe dankas, ne nur por la vortoj de s-o Merchant, sed ankaŭ por la multaj amikaj elmontritoj kiujn li ricevas de ĉiuj flankoj senescepte, kaj promesas fari sian eblon en la lin honorinta ofico al kiu oni elektis lin.

Oni transiras al la afero de interna regularo. D-o Privat klarigas ke tion devas starigi K. R. laŭ la Kontrakto de Helsinko mem, kaj ankaŭ laŭ tiu Kontrakto Centra Komitato devas publikigi ĝin. Centra Komitato devas eldoni libron kun la Deklaracio de Boulogne, Kontrakto de Helsinko, Regularo de la Lingva Komitato kaj Akademio, Regularo de Centra Komitato, Regularo de K. R. kaj la Regularo de la Kongresoj. Li petas, ke la Sekretario-kasisto donu siajn ideojn pri tiu regularo.

La Sekretario-kasisto klarigas, ke ne estas facile starigi modelan regularon, ĝis la sperto mem montris, post iom da praktikado, la bezonatajn decidojn. Tamen, oni jam antaŭvidas diversajn difinitajn aferojn. Regularon oni ne povas facile starigi en kunveno. Li tial proponas, ke la Estraro, interkonsiliginte kun kelkaj juristaj helpantoj, starigu projekton pri regularo, kiun oni dissendu al ĉiu Nacia Societo por opinioj. Ricevinte la opiniojn la Estraro dissendu ĉion por voĉdonado skriba.

La Prezidanto petas opiniojn de la Reprezentantoj pri tiu plano kaj s-o Isbrücker diras, ke la plano estas iom tro komplika, kvankam plene demokrata.

D-o Privat proponas, ke la prezidanto petu ideojn nun por ke la Estraro verku projekton kaj dissendu ĝin por voĉdono.

La prezidanto akceptas la proponon kaj petas ideojn.

S-o Poncet diras, ke li havas instrukciojn de Franca Societo, ke ne estu nur unu reprezentanto de ĉiu Societo.

La prezidanto klarigas, ke por starigi tiun principon oni devus ŝanĝi la kontrakton de Helsinko. Li proponas, ke ĉiu reprezentanto havu apud si anstataŭanton aŭ anstataŭantojn, kiuj povas paroli pri specialaj temoj sed ne voĉdoni.

D-o Privat proponas enkorpiĝi tion en la regularo starigota.

S-o Fischer parolas pri la voĉdonrajto. Kiel oni povas kontroli la nombron de membroj? Societo povas pagi por pli da membroj ol ĝi havas por akiri pli grandan voĉdonrajton, kaj aliflanke, Societo povas pagi por malpli da membroj ol ĝi havas kaj tamen konservi sian rajton paroli pri ĉiuj aferoj.

S-o D-o Arnholt konsentas, ke ekzistas danĝero, ke Societo certigu pli da membroj ol ĝi efektive havas, tiel ĝi povos havi tro grandan voĉon.

S-o Isbrücker proponas, ke oni petu nomarojn de membroj. Tiun ideon oni malakceptas pro la laboro necesa.

D-o Privat atentigas pri jam akceptita rekomendo, ke ĉiu Societo sendu provizon da Esperantaj resumoj pri sia jara raporto al la Estraro por interŝanĝo inter la membraj Societoj de K. R. Li petas, kiom da Societoj sendis laŭ tiu rekomendo. Ŝajne neniu. Oni komentas, ke K. R. rekomendu la proponon.

S-o Fischer diras, ke la raporto ne sufiĉas.

S-o Hromada respondas, ke la bilanco povas esti enmetata. Tion oni aprobas.

D-o Arnholt rekomendas, ke Kongresa kotizaĵo enhavu rabaton por membro de UEA kaj plian rabaton por membro de Nacia Societo.

La prezidanto konigas proponon en letero de UEA de Estonio, ke ĉiuj Naciaj Societoj, aliĝantaj al K. R., pagu al ĝi kvinonon de sia ĝenerala kotizaĵo enspezo.

La Sekretario-kasisto atentigas pri la rezolucio de Genève pri financo de K. R. kiu petas la Naciajn Societojn pristudi la demandon pri estonta pli definitiva pagsystemo kaj sendi pri tio koncizajn opiniojn al la Estraro, por ke oni povu prezenti la tutan aferon kiel eble plej klare dum la Kongreso en 1925. Li atentigas ke ĝis nun li nur ricevis opinion de la Societo de Estonio. Li havas la ideon postuli la opiniojn de la aliaj Societoj per baldaŭ dissendota cirkulero. Kiam li havas ĉiujn opiniojn li celas ilin multoblige maŝinskribe por dissendo, por ke ĉiu Societo havu la opiniojn de ĉiuj aliaj. Por faciligi la laboron la opinioj tamen estu koncizaj.

S-o Merchant atentigas, ke la britoj ne povas akcepti la proponon de la Societo Estonia.

S-o Hromada, membro de la komisiono studinta la aferon en Genève, diras ke K. R. devas fari budgeton kaj tiam peti kotizon laŭ UEA kotiza bazo.

S-o D-o Arnholt atentigas, ke la bazo en Genève estas tiu de Helsinko. Oni konsentis tie, ke ĝi estas la plej bona bazo.

La sekretario-kasisto diras, ke por ke K. R. faru budgeton estas unue necese, ke Centra Komitato faru budgeton. Li tamen trifoje petis budgeton de Centra Komitato sed ne ricevis.

D-o Privat klarigas, ke Centra Komitato ne povis fari budgeton ĝis oni sciis proksimume kiom K. R. enspezos. Estus ridinde, ke oni faru grandiozan budgeton por bagatela sumo. Li atentigas pri la bilanco de Centra Komitato en la Kongresa libro, kaj aludas pri la fakto ke por la unua fojo oficialaj institucioj krom UEA donas bilancojn. Li poste klarigas la bilancojn de Centra Komitato kaj petas, ke K. R. ne postulu budgeton por tiel malgranda sumo. Centra Komitato tamen povos fari proporciojn por la elspezoj.

S-o D-o Dietherle rimarkas, ke la bilancoj estas en brita mono, kaj petas ke oni prefere kalkulu laŭ svisaj frankoj.

D-o Privat klarigas, ke s-oj Page kaj Edmonds, la kasistoj de la du institucioj estas britoj kaj devas teni monon en la banko ktp. en brita mono. Sed en la presajoj oni povas transkalkuli la sumojn ĉe la flanko.

S-o Blicher rimarkas en la bilanco de Centra Komitato pri pago farita al ĝi de UEA. Je kia bazo oni kalkulas tion?

D-o Privat klarigas, ke laŭ la kontrakto de Helsinko Centra Komitato ricevas subvencion de UEA. Tamen, krom tio UEA eldonas siakoste la jarlibron de la movado, helpas pri sekretariatoj por la Centra Komitato ktp. Li demandas ĉu UEA ankaŭ montru tion en la kalkuloj.

Prof. D-o Kamaryt subtenas tiun ideon. Oni sciu, kiom kostas la administrado.

S-o Fischer diras, ke se oni nur vidas subvencion, oni ne komprenas, kiom efektive donas UEA.

D-o Privat memorigas, ke laŭ la kontrakto de Helsinko la Centra Komitato havas la devon, nun eldoni la oficialajn dokumentojn de la movado. La sekretario-kasisto parolas pri tiu temo kaj insistas, ke ankaŭ Centra Komitato devas, eĉ antaŭ ĉiu alia, obei la leĝon. Estas necese, ke ĝi eldonu la raportojn ne aperintajn, kiuj devas esti presataj en sama formato kiel la antaŭaj raportoj. Eble malmultaj personoj legas tiujn raportojn, kiuj tamen estas bezonataj por konservi la historion en la Bibliotekoj. Ili ankaŭ estas trege utilaj por ebligi al personoj studi la historion oficialan de la movado. Li mem konservas la tutan serion kaj antaŭ ol veni al la nuna Kongreso li denove legis ĉiun raporton de Boulogne ĝis tiu de Praha. La aliaj mankas. Se la reprezentantoj ne donas al li specialan ordonon li pagos nenium monon al Centra Komitato ĝis tiuj raportoj aperas.

D-o Privat konsentas kaj laŭdas tiujn rimarkojn, sed riproĉetas, ke Centra Komitato ne povas pagi por la eldono de la raportoj, se K. R. ne donas al ĝi la necesan monon. Kion do fari?

La sekretario-kasisto antaŭvidis tiun malfacilaĵon kaj proponas, ke K. R. ĉiam malfruigu iomete rilate al pagoj al Centra Komitato. Nuntempe K. R. havas la kotizaĵojn de la Naciaj Societoj por 1925. K. R. nun vidis la raporton de Centra Komitato pri sia agado, kiun ĝi certe ne malaprobas. K. R. tial povas nun pagi al Centra Komitato ĝian enspezon por 1925. Post la kongreso en 1925, kiam K. R. ricevis alian raporton de Centra Komitato ĝi povas pagi al Centra Komitato la enspezon por 1924 ktp.

Tiun proponon ĉiu aplaŭde akceptas.

D-o Privat diras, ke se Centra Komitato respondas por la eldono de la kongresaj raportoj, ĝi estus devinta ricevi la monon, kiun la okazintaj kongresoj en Helsinko kaj Nürnberg flankemetis por tiu ĉelo. Tium monon la kongresorganizintoj fordonis, sed la raportoj ne aperis.

Prof. D-o Kamaryt surpriziĝas pri la mona afero. Li estis ano de K. K. K., sed ricevis neniam sciigon pri tiu afero.

S-o Hromada atentigas pri la sistemo de K. K. K.

S-oj Poncet, Isbrücker, Delanoue parolas pri la temo.

S-o D-o Dietherle proponas, ke oni oficiale deklaru en la kongreso, ke ĉiu profito de la kongresoj apartenas al Centra Komitato.

D-o Privat diras, ke la Centra Komitato havas la opinion, ke la afero tiel perdigas al ni tempon, ke ne valoras plu daŭrigi la diskutadon. Ni lasu la tutan aferon kiel prahistorion. La organizintoj de la kongreso en Nürnberg ankoraŭ havas malgrandan sumon. Ili donu tion al Centra Komitato por la presigo de la raportoj kaj tiam ni finu pri la afero.

S-o Edmonds subtenas la ideon, ke oni ne plu diskutu.

D-o Privat formale petas al s-o Hönigsberger, kiu ĉeestas, ĉu li en la nomo de la Nürnbergga Komitato povas konsenti pagi la monon restantan al Centra Komitato.

S-o Hönigsberger diras, ke se estas laŭleĝe li tion faros.

La reprezentantoj konsentas, ke tiu estas la laŭleĝa agadmaniero kaj dankas al s-o Hönigsberger.

D-o Privat anoncas, ke s-o Feilh deziras fari paroladon en la Kongreso pri defendo de Esperanto ĉe lingvaj kontraŭuloj. Li proponas, ke la reprezentantoj kunvenu denove vespere, por aŭdi s-on Feilh, kaj ke ili konduku al la kunveno laŭeble la propagandistojn kaj instruistojn el siaj landoj en la kongreso. Plue, ne venis invito por kongreso en 1925. Estas en la manoj de Centra Komitato eĉ decidi, ke ne okazu kongreso dum la venonta jaro, sed antaŭ ol fari ian decidon la Centra Komitato deziras esplori la eblecojn en ĉiuj landoj kaj aŭdi la opiniojn de la reprezentantoj. Tium temon oni ankaŭ enmetu en la tagordon de la kunveno vespera.

La prezidanto petas, ĉu oni akceptas tiun proponon kaj oni unuanime konsentas.

\* \* \*

La 9 aŭg. vespere okazis la 3-a kunsido de K. R. ĉe kiu ankaŭ kunsidis propagandistoj kaj instruistoj diverslandaj.

S-o Feilh parolas pri la bontaktia defendo de Esperanto ĉe lingvaj kontraŭuloj. La prez. s-o Merchant dankas al s-o Feilh en la nomo de la kunveno, kaj petas lin verki artikolon pri tiu temo, kiun la estraro povos dissendi al la Naciaj Societoj por ilia informo.

Sekvas la demando pri la estontaj konferencoj kaj kongresoj.

Principe oni decidis okazigi konferencon en Paris dum printempo 1925 kaj Universalan Kongreson en Britujo 1926. Ne venis invito por 1925, sed pri tiu afero Centra Komitato petos la opiniojn de kongresa kunsido.

Charles H. Edmonds, sekretario-kasisto.